N-ro 2 - 2016

Martinus Institut

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus

**Martinus:**
La bestaj kaj homaj pensklimatoj
Simbolo n-ro 33

**Martinus:**
La unupolusa estulo
Simbolo n-ro 93


**Martinus:**
La du polusstatoj de la estulo
Simbolo n-ro 94

**Martinus:**
La dupolusa estulo
Simbolo n-ro 95

**Martinus:**
La geedzeco

**Mihai Trifoi:**
Recenzo pri "Martinus kaj la monda moralo" de Ole Therkelsen

**Javier Romero:**
Centro Martinus – Herrera del Duque



© Martinus Institut 1981 Reg. 95

*La dupolusa estulo*

Esperanto

Kara leganto,
tre aktuala temo por la homaro estas rilatoj inter viro kaj virino kaj krome ankaŭ pli kaj pli rilatoj inter du virinoj aŭ inter du viroj. En tiu ĉi numero de Esperanto-Kosmos la fokuso estas je la tiel nomataj "seksaj polusoj": *la maskla poluso kaj la femala poluso*. Tiuj du polusoj (kiuj ekzistas en nia superkonscio) kaj la rilato inter ili influas nian tutan vivon kaj niajn ĉiutagajn agojn, ekzemple en la tiel nomataj *amrilatoj*.

Laŭ la analizoj de Martinus estas la du seksaj polusoj en ni kiuj decidas ĉu ni aperas kiel viro aŭ virino. Evoluintaj bestoj estas tiel nomataj "unupolusaj", t.e. unu el la polusoj estas domina kaj la alia latenta. Pro tio plej ofte estas klaraj "roloj" por la bestoj inter la seksoj, ekzemple la in-bestoj ĉefprizorgas la idojn. En ni terhomoj la fortodiferenco inter la seksaj polusoj estas pli ekvilibraj, sed daŭre unu el la polusoj estas pli "granda" aŭ "forta" ol la alia. Martinus parolas pri nia "ordinara poluso" kaj nia "mala poluso". Por virino la femala poluso estas la ordinara kaj la maskla poluso estas la mala. Se estas granda fortodiferenco inter la du polusoj en terhomo, ĝi aperas kiel tre "ina" se temas pri virino kaj tre "vira" se temas pri viro. Se la fortodiferenco estas malgranda inter la du polusoj en terhomo, ĝi aperas kiel pli-malpli androgina homo kun tre granda intereso pri ekzemple arto aŭ scienco aŭ io alia kio ne rilatas al idoj, hejmo, familio, seksaj rilatoj ks.

En nia "kosma vojaĝo", vivon post vivo kiel terhomo, nia mala poluso evoluas kaj "fortiĝas" kaj nia ordinara poluso iom "malfortiĝas". Kiam la du polusoj preskaŭ atingas ekvilibron, ni jam estas sufiĉe proksime al plene forlasi la bestoregnon. Sed dum ankoraŭ kelkaj vivoj ni finpoluru nian karakteron por ke ni iĝu plene amemaj, pacemaj, vivosaĝaj estuloj kaj samtempe pli "dupolusecaj". Tiu finpolurado okazas i.a. en nia familia vivo en kiu ofte estas intensaj kaj proksimaj rilatoj.

Povas aperi plej diversaj malfacilaĵoj kaj problemoj kiam terhomo proksimiĝas al "dupoluseco", t.e. ekvilibro inter la du internaj seksaj polusoj. Pro tio tre indas studi tiun ĉi kampon kaj ekkonscii pri kiel la polusoj povas "gvidi" nin en diversajn evoluvojojn. Ekzemple samseksemo, seksaj devojiĝoj kaj nova kares-seksumado estas tiaj evoluvojoj. La tuta kvina volumo de *Livets Bog* temas pri la seksaj polusoj, diversaj kategorioj de homtipoj rilate al la seksaj polusoj ktp. (Tiu volumo ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto.)

Kiam Martinus en la artikolo "La geedzeco" priskribas la paradizan staton en la bestoregno inter vir- kaj in-bestoj, li ne eniras detalojn sed parolas pri la ĝeneralaj principoj. Ĝenerale estas pli simplaj rilatoj inter la seksoj en la bestoregno, ekzemple ne estas longdaŭraj ĵaluzoj en tiu regno. Kiam birdoparo havas idojn, ili plene fokusiĝas je la prizorgado de la etuloj sen ajna interveno de aliaj interesoj aŭ ŝatokupoj. Sed tiel ne estas por ni modernaj terhomoj... Ni kutime havas multajn interesojn ekster la familia rondo, kaj sekve pli da problemoj kaj malfacilaĵoj en la familia vivo.

Kompreneble ne sufiĉas revunumero por kovri la grandegan temon pri la seksaj polusoj. Sed espereble la enhavo, kun tri simboloj de Martinus pri la maskla kaj femala polusoj, donos al vi ion interesan kaj pripensindan!

*Hokan Lundberg*

# La bestaj kaj homaj pensklimatoj

## Simbolo n-ro 33

*Eltiro el la enkonduka teksto de simbolo n-ro 33 "La bestaj kaj homaj pensklimatoj". La tutan tekston eblas legi en La Eterna Mondbildo 3.*

**33.1 "La malbono" kaj "la bono"**

Kiel ni ekkonis antaŭ longe, la tera homo estas nefinevoluinta estulo. Ĝi troviĝas en la transira stadio de besto al homo. Tial ĝi havas degenerantan bestan konscion kaj kreskantan homan konscion. Ĉar la homoj ne estas same progresintaj en tiu transformiĝo, do troviĝas iuj, kiuj ankoraŭ havas multe da besta konscio kaj tre malmulte da homa konscio, same kiel troviĝas homoj kun multe da homa konscio kaj kun tre malmulte da besta konscio. Efektive la bestan konscion en la homo ni konas kiel "la malbonon", dum la homan konscion en la tera homo ni konas kiel "la bonon".

Ĝuste la homa konscio kreskas, kaj la besta konscio degeneras kaj malaperos ĉe la tera homo, kaj tial ne estas strange, ke per la humanaj religioj la principo de mondliberigado inspiras kaj instruas al la homoj fari "la bonon", nome la homecon de la homo. La bazo por tiu konduto estas ĝuste la ago ami Dion super ĉiuj aferoj kaj sian proksimulon kiel sin mem (Mat. 22.37-39).

**33.2 La transformiĝo de besto al homo ne estas vola ago, sed estas kreskado**

La transformiĝo de la homoj de besto al homo ne estas vola ago kiel la agoj iri kaj stari aŭ kuri, diri jes aŭ ne, aŭ decidi kiam manĝi kaj trinki. Male tiu baza transformiĝo estas kreskado aŭ evoluo same kiel la proceso fariĝi geniulo en muziko, pentroarto aŭ en alia formo de geniaĵo. Povi ami sian proksimulon kiel sin mem kaj per tio ami Dion super ĉiuj aferoj (Mat. 22.37-39), tio estas la samo kiel esti morala geniulo. Kaj tiu genieco estas akirebla nur per evoluo. Kaj ĝuste tiu evoluo al morala genieco okazas en la nefina homo en la besta regno. Fariĝi morala geniulo signifas fariĝi homo, kies konduto estas ĉioamo, kaj kiu sekve aperas kiel la homo laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27).

**33.3 La plej alta fajro**

La portanta kosma organa fundamento por la vivtravivado de la viva estulo, por la multaj stadioj de ĝia konscio, kaj por ĝia transformiĝo de besto al homo, estas ĝiaj simpatiaj dispozicioj, kiuj signifas la organstrukturon de la plej alta fajro. Tiun strukturon ĝi havas kiel bazon por la ciklopasado tra la regiono de lumo kaj mallumo. Ĝi realigas la aperon de la estulo kiel vir-seka estulo, in-seksa estulo kaj homseksa estulo. Tiu lasta signifas: la finan homon laŭ la bildo de Dio (Gen. 1.26-27). La plej alta fajro estas bazo kaj por milito kaj por paco, kaj per tio ĝi estas ĉeforgano por la sortokreado de la estulo. Ĝi havas sian bazon en la superkonscio de la estulo, kaj ĝi realiĝas per la praavido kaj la patrina energio, kaj de tie ĝi aktiviĝas pere de la ses bazaj energioj, kiujn ni jam konas kiel la instinkto-, pezo-, sento-, inteligento-, intuicio-, kaj memoroenergion. Ĝi realigas la kontrastprincipon, kiu ebligas ĉian formon de perceptado.


### 33.4 La maskla poluso kaj la femala poluso

La du plej grandajn ĉeforganojn de la plej alta fajro ni konas kiel “la masklan poluson” kaj “la femalan poluson”. Tiuj du polusoj ĉeestas en ĉiu viva estulo. Ili ekzistas en la estulo en eterna reciproke ŝanĝiĝanta rilato unu al la alia. Tiuj reciproke ŝanĝiĝantaj rilatoj rezultigas konforme ŝanĝiĝantajn transformojn de la koncerna viva estulo. Tiuj transformoj estas kaj fizikaj kaj psikaj. Ili transformas kaj organismon kaj menson. Rigardante la ĉiuspecajn mineralojn, plantojn, bestojn kaj terajn homojn, ni vidas, almenaŭ laŭ kosma vidpunkto, ke ili ĉiuj reprezentas vivoformojn, kiuj ŝanĝiĝis de antaŭa malpli alta stato al ilia nuntempe pli evoluinta stato. Kaj tie ni vidas ankaŭ, ke la nuntempaj vivoformoj troviĝas en ŝanĝiĝo al novaj statoj. Tiun transformoprocesson ni komprenu kiel “la kreadon de la homo fare de Dio laŭ lia bildo simila al li” (Gen. 1.26-27). La antaŭe menciitaj vivoformoj: mineraloj, plantoj, bestoj kaj teraj homoj reprezentas evolu- aŭ kreostadiojn, kiujn ĉiu viva estulo devas trasperti por fariĝi la perfekta aŭ fina homo laŭ la bildo de Dio simila al li. Tiu kreado fare de Dio transformas beston al homo, kaj sekve ĝi transformas mortigan kaj vivdetruan estulon al estulo, kiu estas ĉioama kaj vivprogresiga, estas ĝojo kaj beno por ĉio viva. De vere diabla homo, geniulo en kreado de la mallumo, ĝi transformiĝas al amestulo, geniulo en kreado de la lumo. Sed du rektaj maloj kiel la diablohomo kaj la dihomo, la homo laŭ la bildo de Dio, absolute ne povas havi saman organan strukturon malantaŭ sia konduto aŭ vivaktivado. Por unu estulo tiu organa strukturo estas tia, ke mortigi por vivi estas vivkondiĉo. Ĉe la alia estulo la organa strukturo estas tia, ke ĝi malebligas al la estulo mortigi, murdi aŭ alimaniere damaĝi vivan estulon. En plej favora kazo ĝi amas sian proksimulon, kiel ĝi amas sin mem, kaj konscias Dion, dum la alia estulo en plej favora kazo povas praktiki nur egoisman simpation, kio signifas: enamiĝon al estulo de mala sekso, en kiu ĝi trovas reciprokan enamiĝon. Tie, kie ĝi ne trovas tiun reciprokan enamiĝon, ĝia pariĝa simpatio facile fariĝas malamo.

Ĉu la estulo apartenas al la mortigaj kaj malamaj estuloj, aŭ ĉu ĝi apartenas al la amaj kaj vivsubtenaj estuloj, tio dependas de la reciproka rilato inter ĝiaj du seksaj polusoj. Ĉe la mortiga kaj senama estulo unu el la du polusoj estas provizore pli aŭ malpli latenta, dum la alia poluso praktike portas la tutajn vivfunkcion kaj konduton. Ĉe iuj estuloj la femala poluso estas la pli aŭ malpli latenta, kaj sekve la maskla poluso estas bazo por la vivfunkcio kaj konduto de la estulo. Tian estulon ni konas kiel “vir-seksan estulon”. Ĉe aliaj estuloj la maskla poluso estas la pli aŭ malpli latenta, kaj sekve la femala poluso estas bazo por la vivfunkcio kaj konduto de la estulo. Tiam la estulo estas “in-seksa estulo”. Ĉar tiel tiuj estuloj estas apartaj vir-sekaj kaj apartaj in-seksaj estuloj, ni nomas ilin “unupolusaj” estuloj.

### 33.5 La vivfundamento de la bestoregno

Tiu unupolusa stato de la estuloj estas do bazo por la psiko kaj konduto de la besto, por ĝia pariĝa instinkto kaj genera sistemo, ĝia mortiga naturo kaj la kreado de la mallumsfero en la spiralciklo. Sed kiamaniere unupoluseco fariĝas la fundamento por kreado de la mallumo? Ĝi fariĝas la fundamento de la mallumo, ĉar ĝi havas organan strukturon, kiu malebligas al la koncerna estulo plenumi la leĝon de amo: Amu vian Dion super ĉiuj aferoj kaj vian proksimulon kiel vin mem (Mat. 22.37-39). Ĉe la unupolusa estulo en



Reg. 33

Simbolo n-ro 33 *La bestaj kaj homaj pensklimatoj*

© Martinus Institut 1981

pura formo la amtalento estas preskaŭ totale latenta. La unupolusa estulo en pura formo estas la samo kiel tiu estulo, kiun ni nomas “besto”. Ĉiu besto havis antaŭan vivon, kie ĝi estis planto, same kiel ankoraŭ pli malantaŭe en la evoluo aŭ la spiralciklo ĝi havis vivoformon, kiun ni konas kiel mineralon. De tiu formo de minerala vivo ĝi transformiĝis al planta vivoformo kaj poste al besta vivoformo.

**33.6 Mineralaj kaj plantaj vivoformoj**

Kiel ni ekkonis per la antaŭaj analizoj, la unua apero de ĉiuj vivoformoj en la fizika sfero okazas en formo de la minerala stato. La konscio aŭ psiko de la mineralaj vivoformoj ankoraŭ ne aperis en la fizika sfero. Sekve la estulo ne havas tagokonscion en tiu sfero. Ĝi troviĝas nur en la spirita sfero en la beatoregno. Tiuj energiformoj, kiuj en la minerala regno aktiviĝas kiel movo kaj kreado, estas subkonscienergio de la estuloj en la beatoregno. Pere de la kreoproceso de Dio la vivoformoj iom post iom atingas la plantajn vivoformojn. En tiuj vivoformoj aperas en ilia psiko la plej unua delikata signeto de fizika tagokonscio. Ĝi estas portata de la instinktenergio kaj aktiviĝas kiel “subsento”. La planto povas per sia fizika organismo subsenti agrablon kaj malagrablon. Ĝi povas senti malvarmon kaj varmon, kaj komencas povi reagi utile al tio. Ĝi povas fermi sin al la nokta malvarmo, kaj poste malfermi sin al la lumo kaj varmo de la suno. Ĝi kompreneble ne povas pensi laŭ fizikaj cirkonstancoj, ĉar ankoraŭ la fizikaj sensoj estas nur en eta komenciĝo. Sed en la spirita sfero tiuj estuloj havas lastan restaĵon de tagokonscio de la beatoregno de la antaŭa spiralciklo, kaj tiun regnon ili nun iom post iom forlasas laŭ la evoluo de siaj fizikaj sensoj, kaj sekve de tio ili povos denove tagokonscie travivi en la fizika sfero. Kiel ni jam scias, tiu lasta restaĵo de tagokonscio estas nur travivado de la memoroj de la nun finspertita spiralciklo. Tie en la retravivado tiuj memoroj troviĝas en brila beatolumo. Tial ni nomis tiujn memorojn “orkopioj”. Ili estas la fintravivaĵoj en kosma spiralciklo.

[...]

**33.17 Estiĝo de proksimula amo**

La unuaj efikoj de la komenciĝanta evoluo de la mala poluso en la homo fariĝis, kiel ni vidis, primitiva sento kaj komenciĝanta inteligento. Tiuj du dispozicioj de kapabloj donis al la estulo komenciĝantan homan talenton. Kaj pro tio ĝi ricevis la nomon “homo”. Sed, ĉar ĝi ankoraŭ havis nur bestan konscion, ĝi povis uzi homan talenton nur serve al sia besta konscio. Esence besta konscio konserviĝas surbaze de la mortiga principo, kaj tial la komenciĝanta homa talento venis en la servon de tiu principo. Kaj per tio la mortiga povo de la homo leviĝis al tia genieco, ke absolute ne estis reale nomi ĝin besta, same kiel ankaŭ ne homa, ĉar la vivfundamento de la homo estas la viviga principo aŭ amo. Tiu stato de la homo estas nek besta nek homa, sed estas kulmino de mallumo, kaj tial necesis nomi ĝin “diablokonscio”. Sed ja ne estas tiu stato de konscio, kiu estas la fina celo por la kreado de la homo fare de Dio laŭ lia bildo simila al li (Gen. 1.26-27). La diablokonscio estas precize rekta malo al la bildo de Dio, kiu estas la samo kiel konduto laŭ totala amo. Sed kiel iu estulo povus atingi ekkonon de tiu ama konduto, se ne surbaze de ĝia kono pri la mallumo? – Kaj kiel ĝi povus ekkoni mallumon, sen fariĝi specialisto pri travivado kaj manifestado de ĝi? Kiel estulo povus fariĝi specialisto pri la spertado kaj manifestado de mallumo, sen ĝuste naskiĝi en ĝi,

kaj de la fundo sperti ĉiujn ĝiajn diversajn stadiojn pere de la organismoj speciale adaptitaj al tiuj stadioj tiel, kiel ĝi ĝuste spertas tion per sia pasado tra la spiralciklo? Helpe de primitiva sento kaj komenciĝanta inteligento, la estulo fariĝis kapabla kontentigi siajn egoismajn avidojn kaj krei mallumon. Sed tie ĝi necese ekvidis, ke tiu vojo ne kondukis al ia ajn stabila feliĉo. La tutan tempon necesis batali kontraŭ tia sorto de la mallumo aŭ sufero kiel tiu, kiun ĝi mem kaŭzis al sia proksimulo, kio signifas: al aliaj estuloj. Tiu konstanta spertado de malluma sorto, tiu maltrankvilo kaj timo, kiun ĝi rezultigis, komencis ŝanĝi ion en la psiko de la estulo. Per spertadoj de la doloroj en sia propra organismo la estuloj komencis povi kompreni doloron kaj suferon de aliaj homoj. Kaj ju pli ili atingis tiun komprenon, des pli da kunsento aŭ kompato ili eksentis al tiuj estuloj. Kaj ĝuste tiu kapablo estas la komenciĝanta kapablo de proksimula amo.

### 33.18 Du specoj de amo

La antaŭe menciita kapablo havas sian propran organan simpatian dispozicion, kaj ĝi apartenas al la mala poluso en la estulo. Tial tiu kapablo ne estu erare komprenata kiel la simpatia dispozicio de la pariĝa instinkto, kiu apartenas al la ordinara poluso en la estulo. La nefina homo estas do samtempe unupolusa pro la domino de la ordinara poluso, kaj dupolusa pro la komenciĝanta funkcio de la mala poluso. La dupoluseco nun iom post iom rezultigas ne nur intelektan evoluon, sed en kunligo kun la malluma sorto aŭ suferoj de la estulo, ĝi komencas evoluigi ankaŭ humanecon aŭ veran proksimulan amon. La komenciĝanta amo diferencas de geedza amo per tio, ke ĝi estas "ĉioamo". Tio signifas: amon, pro kiu la estulo sentas kompaton al ĉiuj suferantaj estuloj, bestoj kiel ankaŭ homoj, amon, pro kiu la estulo preferas doni ol preni, amon, pro kiu la estulo ne povas mortigi, murdi aŭ militi, amon, pro kiu la estulo pardonas al siaj malamikoj kaj plenumas la ordonon de Kristo: "Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj" (Mat. 5.44).

Ĉi tie ni do vidas veran kaj absolutan amon, tiun, kiu estas la baza tono de la universo, kaj sur kiu estas bazita la tuta universo. Estas facile vidi, ke tiu absoluta amo estas io tute alia ol geedza amo aŭ pariĝa simpatio, pro kiu oni povas ami nur estulojn de la mala sekso, havi simpation por la geedzo kaj la idoj. Sed ekster tio, tiu pariĝa simpatio kreas nur ĵaluzon, kripligajn kaj mortigajn ĵaluzdramojn, militostatojn kaj sangajn venĝojn, kiel vivkondiĉajn fundamentojn en la besta sinkonserva instinkto de la ankoraŭ primitivaj estuloj. Tion krome emfazas la organismoj de la bestoj, el kiuj la plej multaj estas ekipitaj per geniaj organaj mortigiloj por la defend- kaj atakpretaĵo de la bestoj. La pariĝa amo estas do absolute ne destinita por krei pacon en la mondo. Ĝia strukturo estas nur organa bazo por fizika organismokreado, kaj por la rezultanta eblo de fizika renaskiĝo aŭ reenkarniĝo de la estuloj. Sen tiu strukturo de generado maleblus vera enkarniĝo de spirito en solidan kaj masivan fizikan materion. Kaj sen enkarniĝo de la estuloj en fizikan materion, ne okazus konscikreado kaj sekve neniu vivtravivado. Ĝuste en la fizika sfero la estuloj ja lernas distingi inter malbono kaj bono. Kaj samgrade, kiel ili akiras tiun konon, ili evoluas por fariĝi fina spirita estulo, kiu ne plu bezonas enkarniĝi en fizikan materion, sed kiu per sia evoluinta amkonscio povas vivi en la plej altaj spiritaj mondoj de la lumo. Estis ja ĝuste pro la evoluo de la kono pri bono kaj malbono, ke la estuloj devis trapasi tiun proceson, kiun la Biblio esprimas kiel "la kreadon de

Eva" (Gen. 2.22), kaj kiu signifas ilian transformon al unupolusaj estuloj. Ĝuste pere de tiu unupolusa stato kun ĝia ĵaluzo, kun ĝia stato de milito kaj mortigado, la estuloj rekte spertas aŭ travivas, kia estas la vivo tie, kie oni ne povas ami sian proksimulon, kiel oni amas sin mem (Mat. 22.39). Tiel la misio de la unupoluseco estas krei kaj konduki la estulojn tra memtravivita scio kaj spertoj pri la strukturo de la mallumo, kaj tra la sekva evoluo de dupoluseco, kiu kaŭzas la intelektigitan senton, kaj kiu estas la samo kiel la absoluta ĉioamo aŭ proksimula amo. Ni traktis do du specojn de amo: la pariĝan amon kaj la ĉioamon. Ni vidis, ke la pariĝa amo estas tiel limigita, ke ĝi povas ampleksi nur la geedzon kaj la idojn. Ekster tiu limigita simpatio ĝi realigas la mallumon, ĵaluzon, malamon kaj militostaton inter la estuloj. Pariĝan amon realigas la ordinara poluso en la nefina homo, kaj ĝi estas: la maskla poluso en la viro kaj la femala poluso en la virino. Ĉar la strukturo de tiu unupolusa stato ebligas al la estulo ami nur estulojn de mala sekso, kaj kreas fortan malsimpation aŭ forpuŝon al estuloj de propra sekso, tial en sia unupolusa stato la estulo neniam ajn povos fariĝi la fina homo laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27). Sekve ĝi ne havas strukturon, per kiu ĝi kapablas ami sian proksimulon kiel ĝi amas sin mem. Ni sekve komprenas, ke la unupolusa stato, kaj ĝiaj tre limigitaj simpatiaj dispozicioj, estas nur io provizora, io, kion anstataŭigos la vera kaj absoluta ĉioamo aŭ proksimula amo, por ke la plano de Dio pri la viva estulo: la homo laŭ la bildo de Dio, povu fariĝi vera realo. La homo laŭ la bildo de Dio estas ja estulo senkondiĉe disradianta la spiriton, lumon kaj varmon de Dio sur ĉion kaj ĉiujn. Tial ne estas strange, ke la dupoluseco aŭ simpatiaj dispozicioj por tiu dia amstato troviĝas en kreskanta evoluo ĉe ĉiuj nefinaj homoj.

**33.19 La naskodoloroj de la dupoluseco**

Same kiel la pariĝa simpatio estigas en la estulo emon karesi la amatan partneron, tiel ankaŭ la dupoluseco aŭ ĉioamo en la estulo estigas emon karesi aliajn estulojn. Laŭ la evoluo tiu emo absolute ne malpligrandiĝos. Sed la emo karesi, kaj mem ricevi karesojn, do ne estas, same kiel la pariĝa amo aŭ enamiĝo, nur emo karesi estulon de la mala sekso. Ĝi evoluas por samgrade estigi emon karesi estulon de sia propra sekso. Kaj per tio la dia transformoproceso, kiu devas fari la beston homo, komencas fariĝi sufero, ja eĉ kataklismo por la koncerna estulo. La granda plimulto de la nefinaj teraj homoj ne povas kompreni homon kun tia simpatio. Ankoraŭ neniam en sia propra konscio ili sentis ion similan al tia pli vasta aminklino. Ili estas eĉ edukitaj por opinii, ke tia simpatio al la propra sekso estas abnormaĵo, perversio aŭ devojiĝo, ja eĉ krimo. Kreiĝis ja leĝoj, eĉ kun mortpuno, por estuloj kun tiu komenciĝanta dia talento de amo. Tiu granda plimulto neniel scias, ke neniam ajn la homoj povos plenumi la grandan ordonon aŭ leĝon de la vivo, sen ĝuste la evoluo de tiu talento. Kiamaniere homo povu atingi ami sian proksimulon kiel sin mem (Mat. 22.39), kiam ĝia simpatia dispozicio estas nur unupolusa, kaj kreas nur malsimpation al estuloj de ĝia propra sekso? – Kaj kiel menciite, sen tiu plenumo de la proksimula amo, neniu ajn homo povus fariĝi la fina homo laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27). Sed tie la nescio de la homoj estas granda ĝeno por la evoluo de la dupoluseco. Se tiuj homoj, en kiuj komencas influi la dupoluseco aŭ tiu talento de amo, malkaŝus, ke ili havas tiun komenciĝantan talenton, kaj se malbonŝance ili montrus per

la okuloj tro grandan varmon al estulo de la propra sekso, aŭ tro dolĉe karesus tiun estulon, tiam ili ja riskus esti konsiderataj kiel maldecaj, perversaj aŭ abnormaj. Per tio kreiĝis la plej efika kerno de la kalumnio, kaj en la fantaziplena mensa tero de la kalumniantoj tiu kerno povas kreski kaj fariĝi arbego de klaĉo, kies venenaj fruktoj haladzigas ĉian mensan sanan aeron kaj verecan pensosferon ĉirkaŭ la transformado de la estulo de besto al homo.

Same kiel virino estas naskita kiel virino, kaj viro estas naskita kiel viro, tiel same la dupolusa estulo estas pli aŭ malpli naskita kiel dupolusa, tute laŭ sia progreso en la evoluo al la fina aŭ perfekta homo. Ĉu utilas persekuti aŭ puni virinon, ĉar ŝi estas naskita kiel virino? – Ĉu pro tio ŝi ĉesas esti virino? – Ĉu utilas puni viron, ĉar li estas naskita kiel viro? – Ĉu pro tio li ĉesas esti viro? – Ĉu ne tia persekuto estus la plej granda malsaĝo? – Ĉu ne same estus plej granda malsaĝo moki, persekuti kaj puni homon, kiu naskiĝis kiel dupolusa? – Puni homon, ĉar ĝi estas naskita kiel dupolusa, kio ja signifas, ke ĝi estas naskita kun pli alta simpatia dispozicio ol la unupolusa simpatia dispozicio, kiu ankoraŭ estas bazo por la plimulto de la homoj de la tero, tio estas same granda malsaĝo, kiel estus puni homon, ĉar ĝi havas bluajn okulojn aŭ ruĝan hararon.

### 33.20 La kaŭzo, ke homoj persekutas dupolusajn estulojn

Kial la homoj estas tiel malicaj kontraŭ dupolusaj estuloj? – Tiun malicon aŭ malsimpation de la homoj kontraŭ dupolusaj estuloj, kaŭzas ekskluzive tiu nescio, kiu kaŭzas ankaŭ ĉiajn aliajn malicon, persekuton, koleron kaj malamon. Tiuj homoj ja ne havas ian specialan scion aŭ komprenon pri la dupolusa simpatia dispozicio, kaj tial ili povas koncepti la dupolusajn homojn nur kiel abnormajn. Kaj rilate al tio efikas ilia besta instinkto, kiun ili ankoraŭ ne tute preterkreskis. Tiu besta instinkto kaŭzas, ke en sia propra raso la besto persekutas kaj mortigas abnormajn estulojn, kiuj ne povas zorgi pri si mem. Ĉe la bestoj en pura formo tiu aranĝo de la naturo ja estas bono. La bestoj ne havas alian solvon, per kiu helpi siajn invalidajn, abnormajn aŭ senhelpajn estulojn. Ĝuste tiu sama instinkto en la primitiva homo igas ĝin senti indignon, malsimpation aŭ amaron kontraŭ homoj, kiuj devias de la grega opinio pri normaleco. La estuloj kredas, ke la simpatiaj sentoj de la dupolusa estulo al estuloj de ĝia propra sekso, estas devojiĝo, io, de kio ili dekutimiĝu. Ili kredas, ke tiu simpatio estas nur vola ago, kiun oni povas regi same, kiel vole oni povas stari aŭ sidi. Ili opinias, ke estas justo puni tiajn estulojn. Ili opinias, ke tiuj estuloj povas kontraŭbatali tian ŝajne malsaĝan senton. – Iomgrade tia estulo povas kompreneble esti devigita ne esprimi tiun sian simpatian senton, sed tio ne ĉesigas ĝian dupolusecon.

### 33.21 La persekuto al la dupoluseco, kaj la sekvantaj efikoj kaj manko de nutro

Kiel fartas estulo fortenata de plenumo de bezono, kiu estas vivkondiĉa kaj natura por ĝiaj psiko, bonfarto kaj spirita kresko? – Estas memkompreneble, ke tia estulo nature kripliĝos anime aŭ spirite, se ĝi ne estas anime bone bazita en Dio. Kiel ĝi povus daŭre sekretigi, kaŝi kaj digi la normalan dupolusecon, kiu kreskas en ĝi? – Tiu digado estas precipe malfacila, ĉar la estulo eĉ ne povas fari la plej etan malfermon sen risko de kalumnio, skandalo, persekuto, puno kaj malestimo. En la estulo tiu nova sentostato estas natura ero en ĝia transformiĝo de besto al homo, kaj sekve la simpati- aŭ sentofluo daŭre kreskas. Per tio la premo fariĝas pli kaj

pli forta por finfine tute rompi la digon. Kaj la digita rivero de la sentoj elfluegas kaj faras por si nenaturajn mensajn vojojn kaj elfluojn, kreas malfeliĉon kaj suferon. Tiuj nenaturaj sentovojoj aŭ forfluoj estas do, pli aŭ malpli, mensaj devojiĝoj. Tiuj devojiĝoj montriĝas per la simpatia dispozicio de la estulo. Ĉar la simpatia dispozicio por la unupoluseco de la estulo estas pli aŭ malpli degenerinta, la pariĝa avido pri la mala sekso samgrade reduktiĝis. En mala kazo ĝi ne estus tiel progresinta en la dupoluseco, kiel ĝi fakte estas. Sed tiu avido de ĝia dupoluseco ne kontentiĝas nature, ĉar ankoraŭ ĝi ne estas matura por tia kontentiĝo, kiu reteniĝas ankaŭ, ĉar la estulo timas kalumnion, skandalon kaj aliajn deprimajn malfacilaĵojn. Per tio povas estiĝi tiu konfuzo en la simpatiaj dispozicioj de la estulo, kiun ni menciis antaŭe kiel digitan senton, kiu rompas la digon kaj faras nenaturajn vojojn por la kontentigo de la du simpatiaj dispozicioj. En plej malbonaj kazoj tiuj nenaturaj kontentiĝoj de la simpatiaj dispozicioj apartenas al la nocioj: perverso, sadismo, plezurmurdo, piromanio kaj kleptomanio, seksaj rilatoj al infanoj kaj seksaj rilatoj al bestoj. Do ne estas eta kaj sensignifa damaĝo, kiun kaŭzas la homa kosma nekompreno aŭ nescio pere de la rezultantaj persekuto, puno, moko kaj kalumnio kontraŭ la natura aktivado de la simpatiaj dispozicioj de la dupolusaj estuloj. En pura formo tiuj dispozicioj estas absoluta ĉioamo. Kiamaniere nefina tera homo povus fariĝi homo laŭ la bildo de Dio (Gen. 1.26-27), kiam ĝi ankoraŭ estas en la mambesta stato? Tio ja signifas, ke ĝi havas amon nur en formo de impulso de enamiĝo al estulo de mala sekso, kaj ke krome ĝi havas tiun amon nur por protekti la idojn. – Esti laŭ la bildo de Dio estas io alia kaj plia ol esti mambesto aŭ estulo, kiu pro sia unupolusa kaj sekve malriĉa amtalento povas ami nur estulon de mala sekso kaj siajn idojn, kaj kiu krom tio povas vivi en la regiono de la mortiga principo, povas buĉi kaj manĝi organismojn de aliaj bestoj, povas vivi en ĵaluzo, milito, malamo kaj amaro, kaj kiu povas esti ŝarĝita aŭ turmentata de krudaj sortostatoj de malsano kaj morto.

**33.22 Kial persekuti kaj moki tiun amtalenton, kiu estas la savo kaj iniciĝo de la homaro?**

Kio mankegas en la mondo? – Ĉu ne mankas sur la tero ĝuste la absoluta kaj vera ĉioamo aŭ proksimula amo reciproke inter la homoj, sendepende de sekso? – Ĉu ne tiu ĉioamo estas ĝuste la stato ne povi elteni mortigi aŭ damaĝi aliajn estulojn? – Ĉu ne tio estas la kapablo povi ami estulojn ankaŭ de sia propra sekso? – Kiel alie la homoj atingus plenumi la grandan amordonon aŭ leĝon de la vivo, nome ami Dion super ĉiuj aferoj kaj sian proksimulon kiel sin mem? (Mat. 22.37-39) – Kiel oni povu, sen vera proksimula amo, forigi la militon kaj ĝiajn teruraĵojn? – Ĉu ne ĝuste la proksimula amo forigas ĉiajn militojn, mizeron kaj malfeliĉon? – Ĉu ne ĝuste ĝi mildigas malĝojojn kaj malfeliĉajn sortojn? – Ĉu ne ĝuste ĝi pardonas ĉian malamikecon kaj ĉian maljuston? – Ĉu ne estas ĝi, kiun la plej grandaj religioj aŭ la mondliberigado nomis la ĝusta vojo al la lumo? – Ĉu ne estas ĝi, pri kiu malsatas kaj soifas ĉiuj progresintaj homoj? – Kiu ne deziras renkonti amon ĉe sia proksimulo? – Kiel sen absoluta proksimula amo la vivo kaj la sorto povus fariĝi vivo de lumo?

Sed kiel tiu amo akiru influon en la vivo de la homaro, kiam plej potence puno, kalumnio, moko, malamo kaj persekuto ŝtopas ĝian komenciĝantan delikatan fonton en tiuj homoj, kie la amo estiĝas? – La homoj ne nur mortigas kaj murdas homojn kaj bestojn, kreas militon kaj suferojn unu por la

aliaj, sed pro sia nescio ili persekutas kaj retenas ankaŭ la talenton en tiuj homoj, kie aperas la dia forto en formo de proksimula amo. Ĉu ne ĝuste estas fakto, ke enamiĝo aŭ pariĝa amo estas destinita ekskluzive al pariĝo, al generado kaj al la idoj, aŭ maksimume al la familio? – Tiu unupolusa simpatia dispozicio sekve neniel povas realigi tiun ĉioamon, kiu faras la homon la bildo de Dio simila al li. La unupolusa simpatio aŭ pariĝa amo sufiĉe klare montras, ke ĝi ne povas forigi militon, malfeliĉon kaj suferojn en la homaro, sed ĝi estis kaj daŭre estas bazo por aperigi grandajn regionojn de "la malbono" aŭ mallumo. Tio sekve montras kiel fakton, ke necesas tute alia simpatia dispozicio, kiu povas krei kaj formi ĝuste la absolutan amon. Tiu amo, kiu do necesas, estas la samo kiel la spirito aŭ konscio de Dio mem. Kaj pro ĝi oni amas ĉion kaj ĉiujn, malbonulojn kaj bonulojn, amikojn kaj malamikojn, riĉulojn kaj malriĉulojn, materiistojn kaj kredantojn, kaj sekve per tiu sia dia konduto oni prezentas la spiriton, forton kaj proksimecon de Dio ĉie, kien oni venas. Pere de tiu luma konduto kaj la sankta spirito de Dio oni travivos la tempon, la spacon, la senfinon kaj eternon en kulmina beato. – Ĉu ia ajn alia formo de spirito, menso kaj konduto ol ĝuste la amo, povas doni al la viva estulo tiun dian, plej altan travivadon aŭ sorton de la kulmina lumo? – Kial do persekuti la unuajn delikatajn ĝermojn de tiu plej alta forto de la vivo, la spirito de Dio, kiam vi renkontas ĝin en la okuloj de via proksimulo aŭ en la karesoj de ĝia mano? – Kial ne danki al Dio, ĉar jam tie vi havas okazon renkonti radiojn de la plej alta fajro en pura formo? – Kial ne malfermi vian koron por tiu dia disradiado de varmo de la eterna lumabundo, malfermi vian koron por la ĉeesto de Dio en la psiko de via frato? – Ĉu iam ajn vi povos veni al pli granda renkontiĝo kun Dio? – Kial do ne malfermi vian menson kaj vian pensmondon por tiu dia lumo, kaj per tio kunfandiĝi kun la flamo de via frato kaj fariĝi unu kun li en la brilabundo de la eterna patro? – Ĉu povas ekzisti pli granda plenumo de la eterna ordono: "Amu vian proksimulon kiel vin mem" (Mat. 22.39)? – Ĉu ne tiu plenumo de la eterna ordono estas la samo kiel plenumo de jena alia eterna ordono: "Amu la Eternulon, vian Dion per via tuta koro kaj via tuta animo kaj per via tuta menso"? (Mat. 22.37) –

Kiel oni povus praktike plenumi tiun grandan ordonon alimaniere ol ĝuste pere de la ĉioamo aŭ proksimula amo? – Ĉu ne nia proksimulo estas la manifestilo de Dio rilate al ni? – Ĉu ne nia rilato al nia proksimulo estas ĝuste nia rilato al Dio? – Kaj ĉu ne nia sorto estas ĝuste la respondo de Dio al ni pri tiu nia rilato al li? – Kiel ni povus praktike travivi la amon de Dio al ni, se ne pere de la amo de nia proksimulo al ni? – Kaj kiel ni povus praktike kaj absolute reale ami Dion per nia tuta koro, per nia tuta animo kaj per nia tuta menso, se ne pere de la amo al nia proksimulo? – Kiel alie ni povus manifesti praktikan amon? – Kaj kiel alie ni povus travivi praktikan amon? – Dio estas fizike manifestita nur en formo de nia proksimulo, kaj tial ni ja povas praktike fizike manifesti nian amon al Dio nur en formo de la amo al nia proksimulo. Ni ne povas praktike karesi ion, kio estas nemanifestita, kaj same ni ankaŭ ne povas travivi praktikan amon en formo de io nemanifestita. Ĉi tie la du menciitaj ordonoj: ami Dion kaj ami sian proksimulon, montriĝas identaj. Efektive tiuj du ordonoj estas do nur unu ordono. La plenumo de tiu unu granda ordono estas la amo al Dio manifestita al nia proksimulo per nia tuta koro, per nia tuta animo kaj per nia tuta menso. Tiu totala plenumo de la menciita ordono estas la fundamento por la totale

perfekta rilato de la estulo al Dio, kaj sekve por ĝia kulmina vivtravivado en la plej alta lumo. Tial ne estas strange, ke laŭ la evoluo estiĝas en la nefina homo la simpatiaj dispozicio kaj talento por ĉioamo aŭ proksimula amo. Kiel alie la besto povus transformiĝi al la fina homo laŭ la bildo de Dio simila al li? (Gen. 1.26-27) – Tie tre altgrade validas tio, ke tiuj, kiuj havas okulojn per kiuj vidi, ili vidas, kaj tiuj, kiuj havas orelojn per kiuj aŭdi, ili aŭdas.

Traduko farita de Ib Schleicher.

# La unupolusa estulo

## Simbolo n-ro 93

*La simbolojn 93, 94 kaj 95 Marinus ne priskribis en iu libro aŭ artikolo, sed li klarigis ilin dum diversaj prelegoj. Malsupre legeblas tiaj dum-prelegaj klarigoj pri tri simboloj kiuj ĉiuj temas pri la seksaj polusoj.*

**93.1** La simbolo montras la konscion de la besto aŭ la unupolusa estulo. La du rondaj figuroj simbolas la du polusojn, la verda esprimu la masklan poluson kaj la flava la femalan poluson. La du polusoj ekzistas en la besto, ili ekzistas en ĉiuj estuloj.

En tiu ĉi estulo la femala poluso ne havas grandan influon, estas la maskla poluso kiu tutan tempon dominas. Ĉe virinoj aŭ in-estuloj estas male, tie la femala poluso dominas kaj la maskla estas latenta. En in-estuloj la mala poluso estas la maskla poluso, kaj en vir-estuloj la mala poluso estas la femala poluso. Pro tio la estuloj estas dividitaj laŭ du kategorioj, viroj kaj virinoj aŭ vir- kaj in-estuloj. Sed tiel ne ĉiam restos, ĉar en la estuloj la polusoj ŝanĝiĝas. En la viro la maskla poluso malfortiĝas, kaj la femala fortiĝas. Sur la simbolo dominas la maskla poluso, kaj estas ĝi kiu portas la bestan principon en la viro. Tamen estas la femala poluso, kiu portas la tutan spiritan aŭ homan flankon en la viro. Laŭ tio, ke la femala poluso grandiĝas, la homa flanko en la viro kreskas.

La violkoloraj kampoj simbolu la superkonscion de la besto, en kiu la polusoj, la sortoelemento kaj la talentokernoj estas konservitaj kaj ekzistas, tiel ke ili ĉi tie povas transvivi la pereon de la korpo. La subkonscio estas simbolita per la regiono inter la du dikaj horizontalaj strekoj. La meza regiono montras, kie la estulo situas evolue. Malsupre ni vidas fortan ruĝan koloron (instiktenergio), kaj pli supre kampon pli oranĝkoloran (pezenergio). La besto ĉefe estas gvidata de instinkt- kaj pezenergio. La pezenergio estas tiu energio, kiu aperigas koleremon kaj furiozon. La besto havas grandan utilon de tiu stato, pro tio ke ĝi mobilizu sin por povi ellasi siajn fortojn, kiam ĝi vivu de korpoj de aliaj bestoj, kio ja okazas per mortigo. Tio ĉi estas la ĉefa parto de la besta konscio, kaj ankaŭ la homoj daŭre havas multe de ĝi. Ni vidas, ke la besto ankaŭ havas iom da sentoenergio, tio estas esprimita per la flava koloro.

Tiel aspektas la plej malalta, la besta estulo, kaj poste ni vidos la plej altan, la perfektan homon.

*De prelego, Tra la morto 2, 1958-05-28*

**93.2** La simbolo montras la bazan strukturon de la besto. Kompreneble estas multaj pliaj detaloj en la


strukturo de la besto, sed en tiu ĉi kuntekksto sufiĉas tio, kio estas montrita en la simbolo. La du rondaj figuroj simbolas la du polusojn de la besto, kie la ordinara poluso estas markita per verda koloro kaj la mala poluso per flavo. La du polusoj estas en tre granda kontrastinterrilato. La simbolo montras virestulon, en kiu la maskla aŭ la ordinara poluso estas domina, dum la femala aŭ la mala poluso estas tute latenta kaj ne ludas iun apartan rolon.

La simbolo povus same bone montri in-estulon kun la mala interrilato, en kiu la femala poluso tiuokaze estus la unuaranga (flava koloro), dum la maskla poluso estus la mala aŭ duaranga poluso (verda koloro).

La violkoloraj kampoj simbolas la superkonscion, en kiu la polusoj, la sortoelemento kaj la talentokernoj situas. Sed la du polusoj ŝanĝiĝos, unu el ili kreskos malsupren, kaj la alia kreskos supren, kaj iam ili renkontos unu la alian kaj fariĝos egalaj. Tio faras, ke la estuloj fariĝos perfektaj homoj. Sed momente estas la besto, kiun ni vidas. Ĝi estas tre vireca aŭ tre virineca, kaj ĝia konscio konsistas el instinktenergio kaj pezenergio (ruĝ-oranĝkolora koloro). Leonoj, tigroj kaj aliaj rabbestoj ja havu tiun ĉi energion por povi kapti kaj venki siajn viktimojn. Ilia furiozo envere ne estas malamikeco, ĝi estas mobilizado de la organismaj fortoj kiel instikt- kaj pezenergio. La unuaranga en la konscio de la besto do estas instinktenergio kaj pezenergio, sed ĝi ankaŭ havas iom da sentoenergio, kiu estas markita per flava koloro.

*De prelego, Post la morto, 1958-06-06*

**93.3** Sur la simbolo ni vidas la ordinaran poluson kaj la malan poluson, kaj en la meza regiono ni vidas la fundamentan parton en la konscio de tiu ĉi estulo: instinktenergio kaj pezenergio (ruĝ-oranĝkolora koloro). Ĝi uzas ĉefe



© Martinus Institut 1981 Reg. 93

*La unupolusa estulo*

la mortigan principon, la primitivan principon defendante sin kaj murdante kaj mortigante aliajn. Tiu ĉi stato estas valida ĉe primitivaj naturhomoj, homomanĝantoj ktp. Ili havas nur iomete da sento, sed ĝi estas evoluinta ĝuste tiel multe, ke ili havas ian religian koncepton.

*De prelego, La plej alta fajro 2, 1960-02-22*

**93.4** ... [similaj simbolpriskriboj kiel supre]
Sed en la primitiva homo ankaŭ estas iom da sento, kiu kaŭzas, ke ĝi fariĝas

religia, ke ĝi komencas kredi ke ekzistas io malantaŭ la tuto.

*De prelego, La plej alta fajro 4, 1960-03-07*

**93.5** Por kompreni, kion homo travivos ene en la spirita sfero, ni lernu vidi, kiujn sensojn tiu homo havas, kiom da intelekto ĝi havas, kion ĝi havas per kio eblas kompreni la spiritan sferon. Ĝi ne povas kompreni la spiritan sferon tie, kie ĝi ne havas sensojn por tio, kie ĝi ne havas emon aŭ intereson. Ĝi povas sperti kaj kompreni la spiritan sferon nur rilate al la konscio, kion ĝi havas.

... [similaj simbolpriskriboj kiel supre]

La sensokapablo de la estulo estas simbolita en la regiono inter la du fortikaj strekoj. La primitiva homo precipe havas instinktenergion, markita per ruĝa koloro, kiu iom post iom transiras al la oranĝkolora koloro, kiu reprezentas pezenergion. Ĝi ankaŭ havas iom da sento, kiu ofte iras direkte al antipatio, malamo, ĉagreno, pro tio ke ĝi mortigu por vivi. Se tia estulo mortigu por vivi, ĝi tute ne konas ion pri amo, ĝi nur konas pri pariĝa instinkto. Ĝi ne povas sperti amon en la spirita sfero. Amosfero ja ne povus esti io por tia estulo. Ĝi povas nur travivi spiritan sferon kiu rilatas al tio, al kio ĝi povas havi kontakton. Oni estas feliĉa, kiam oni estas en kontakto kun sia propra sfero, sia naturo, kaj la estulo sekve fariĝos feliĉa en sia propra spirita sfero.

*De prelego, La eterna vivo 4, 1962-05-17*

# La du polusstatoj de la estulo

## Simbolo n-ro 94

**94.1** Ni nun venas al la terhomo, kiu en sia konscistrukturo ne estas tiom longe for de la unupolusa estulo sur la antaŭa simbolo.


*De prelego, Post la morto, 1958-06-06*

**94.2** Ĉar la homoj trairis tiel rapidan evoluon de inteligento, kiel ili faris, tio kaŭzis, ke ili povis uzi tiun ĉi kapablon, ĉi tiujn fortojn, kiujn ili regas, en la servo de sia primitiva kaj daŭre neevoluinta naturo, t.e. en la servo de egoismo kaj memintereso. La homo ja venas el la bestoregno, kaj tiu ĉi transformado de besto al homo okazas tra la du seksaj polusoj, la maskla poluso kaj la femala poluso. En unu stadio en la bestoregno la polusoj estis tre kontrastaj en la estulo, unu poluso estis domina, dum la alia estis latenta. En la vir-estulo la maskla poluso estis domina kaj la femala latenta. En la in-estulo estis male, tie la femala poluso estis domina, kaj la maskla latenta. Sed en certa momento la latenta poluso komencis evolui. Tio estis necesa, ĉar la estulo ne restu besto. La intenco ja estas, ke la estulo fariĝu homo laŭ la bildo de Dio simila al Dio, kaj ne eblas diri, ke besto estas tia.

La estulo ŝanĝiĝu, necesis pli por fariĝi homo laŭ la bildo de Dio. Tio, kio aldoniĝu, estis provizore certa grado da intelekteco. La estulo per tiu ĉi intelekteco faru multegajn spertojn, kiuj estis efikoj de ĝia nepreta mensostato, de ĝiaj ankoraŭ bestaj tendencoj. Ni vidas, ke tio kulminis en tio, ke oni kapablas krei la plej terurajn, mortigajn armilojn. Oni povas multobligi la bestajn tendencojn, oni povas proprigi multajn egoismajn ĝuojn ĝuste per tiu ĉi inteligento. La saĝaj ekspluatas la malpli saĝajn. Nuntempe ni spertas ĝuste tiun tutan nepretan kaj neperfektan staton

en formo de la tiel nomata juĝotago, kiu estis antaŭvidata en la Biblio. Kristo ja antaŭvidis, ke tiu ĉi juĝotago venos. La juĝotago estas la granda rezulto de homa kapablo stirata de besta mensostato.

Kompreneble ne estas nur bestecaj realaĵoj, kiuj ekzistas en la mondo. La homaro ja iagrade evoluigis ankaŭ alian flankon, la dupolusan staton. La unua flanko en tiu ĉi evoluo estis la evoluigado de la inteligento, kaj la dua flanko, kiu evoluu, tio estas la ama flanko aŭ la humana kapablo. Ĝi ne povas, kiel la inteligento, esti evoluigata per instruado. Oni ne povas lerni esti amanta, sed oni povas lerni intelektajn aferojn, oni povas lerni, kiel aferoj estu kreitaj. Oni povas ankaŭ lerni, kiel amanta estulo agas, sed per tio oni mem ne fariĝas amanta estulo. Se oni fariĝas amanta estulo per gvidado, tiuokaze estas pro tio ke oni jam havas tiun amkapablon, sed eble ne komprenis kiel uzi ĝin ĝusta-maniere. La amo aŭ la humaneco ne povus aperi en tiel rapida maniero kiel la inteligento-evoluigado. La amo aŭ la humaneco nur povas aperi per travivaĵoj, kaj ja devis esti sufertravivaĵoj, kiuj unualoke ekvalidis.


© Martinus Institut 1981 Reg. 94

*La du polusstatoj de la estulo*

La mondo hodiaŭ estas tiom plena je sufertravivaĵoj, malsanoj, krizoj kaj mizero, samtempe kun tio ke la homoj havas grandegan inteligenton kaj enormajn geniajn bonaĵojn. Sed tamen estas milionoj da homoj, kiuj mortas pro malsato, kaj estas milionoj da homoj, kiuj ne havas aliron al malsanulejo kaj ne povas esti kuracataj. Estas do enorma oceano da teruraj, nepretaj statoj, kaj ĉi tiuj nepretaj statoj ŝuldiĝas senescepte al manko de amo, manko de humaneco. Tiu ĉi humaneco aperas unuavice per tio, ke la homoj trairas sufertravivaĵojn. Danke al ĉiuj tiuj suferoj, kiujn homo trairis dum siaj diversaj vivoj, naskiĝis la kapablo kompreni suferojn de aliaj estuloj. Oni ekhavas fantazikapablon, per kiu oni povas fantazie ekhavi mensan komprenon pri, kiel tiu kaj tiu sufero influas tiun kaj tiun homon aŭ tiun kaj tiun beston aŭ tiun kaj tiun planton. Oni povas fariĝi senfine kompleta rilate al povi sperti suferojn de aliaj en sia konscio, kaj tiu ĉi kapablo do nur povas aperi tra sufersituacioj. Oni ne povas atingi tion lernante, sed tra ĉiuj sufertravivaĵoj, malsanoj kaj malfacilaĵoj, kiujn ni havis dum pasintaj estadoj, ĝi aperis en nia plej alta strukturo, en nia superkonscio. Ni ne povas memori tion tagkonscie, sed la

spertoj aperas kaj influas nin en certaj situacioj kaj helpas al ni krei bildon de la objekto, pri kiu ni tiumomente pensas, ekzemple pri malsana homo. Se ni spertis ion similan, tio kaŭzas en nia fantazio, ke ni tuj komprenas la situacion. Ni povas tute klare kompreni, kiel tiu homo fartas, aŭ kiel tiu aŭ tiu situacio sentiĝas. Estas tiu ĉi kapablo, kiun ni nomas kompatkapablo. La kompatkapablo larĝiĝas kaj evoluas pli kaj pli. Estos ne nur la krudaj suferoj, la krudaj travivaĵoj de malfeliĉoj ktp, kiujn oni povas senti, sed estos ankaŭ multaj subtilaj detaloj. Oni diras, ke homo estas fajnsentanto. Ĝi rimarkas ne nur la suferojn ĉe aliaj, ĝi rimarkas ankaŭ vortojn kaj frazojn, kiujn ĝi ne volas diri, ĉar tio malagrable kaj ĝene influus la koncernajn homojn.

Tio ĉi influos la homon pli kaj pli, kaj sekve aperos ia simpatistato. Iom post iom la homo ekhavas simpation por aliaj homoj. Eble sonas strange, ĉar oni ja opinias, ke kompreneble ĉiuj homoj havas iom da simpatio. Tion ili havas ankaŭ hodiaŭ, sed ni memoru, ke ni venas de malsupre de la besto. Ni venas de stato, kie la konscio ne povis okupi sin pri io alia ol la pariĝa instinkto kaj la protektado de la idaro, kaj kie tio ĉi estis la plej alta lumo, kiu entute estis travivebla en la fizika sfero. Tiel ja daŭre grandparte estas por la terhomoj en iliaj unua granda evoluo kadre de la homregno. Tie la pariĝa instinkto ankoraŭ estas la plej alta lumo. Tio ĉi pri enamiĝi, esti amata kaj redoni amon, ke ili ekhavas infanojn kaj adoras ĉi tiujn infanojn, ja estas dieca lummondo, kiun ili travivos ĉi tie en la mallumo. Kio alia estus lumo, se ne tio ĉi estus lumo? Kaj ĉu ekzistas iu alia lumo por la bestoj ol tiu ĉi pariĝa stato? Ĉu ne estas tiel, ke ĉiuj bestoj devas agi laŭ la maniero esti sin mem plej proksima? Ĉu ne estas tiel ke la mortiga principo estas vivnecesa en la bestoregno? Ĉu ne estas tiel, ke ankaŭ por la homoj tre altgrade en ilia evoluo estas vivnecese mortigi? Kial entute la homoj militas? Kial ili detruas, mortigas kaj murdas kaj malamas? Estas do ĉi tiuj kondiĉoj, kiuj apartenas al ĉi tiuj evoluŝtupoj. La pariĝa avido, la seksa ĝuado, la sento de beno, kiu aperas, kiam du estuloj en ilia enamiĝemo aŭ ebrieco plenumas la pariĝan akton, estas la plej alta flamo, kiu ekzistas en la bestoregno.

Sed tio ne estas la fina rezulto de la evoluo de la homaro kaj de la kreado de Dio de la homo. Tio estas la fina rezulto de la bestostato, sed la homaro atingu ion multe pli altan. La besto havas sian aman simpatistaton kadre de la pariĝa regiono kun sia kunulo kaj sia idaro, sed al estuloj eksteraj nur povas temi pri ia toleremo en formo de ia gregokonscio, al kiu la estulo devas aparteni por povi protekti sin. La specioj devas esti en gregoformiĝoj por povi pli bone protekti sin en la diversaj situacioj, kiujn ili trairas. Sed tiu ĉi gregokonscio ne estas amostato. Ĝi eĉ ne estas simpatistato, ĝi estas instinkteca, aŭtomata kuniĝo de la estuloj. Ankaŭ ĉe la homoj ĝi ekzistas iagrade en formo de ĉiuj unuiĝoj, organizoj ktp. Tio estas postefikoj de tiu ĉi stato. Organizkreado ja ankaŭ estas popolklerigado por pli bone ekhavi forton kaj potencon por povi atingi celon. Sed ĝi ne estas amo. Tra la suferspertoj evoluas la simpatisento, kiun ni nomas amo.

Kadre de la homoregno ekzistas la eldiro “vi amu vian proksimulon kiel vin mem”. Kiam tio estas la celo, kaj la homoj vere amos sian proksimulon kiel sin mem, kio do okazos pri la geedzeco? Kion dirus la edzino, kaze ke la viro amus ĉiujn aliajn same multe kiel ŝin? Aŭ male, kion dirus la viro, kaze ke la edzino feliĉe brakumus kaj karesus ĉiujn homojn? Ĉu eblus havi feliĉan geedzecon? Ne, ne eblus tion havi, ĉar la geedzeco ne baziĝas je vera

amo. La geedzeco baziĝas je artefarita simpatistato. Ĝi funkcias per forto de organa strukturo tra aperigo de sekrecioj ktp, kiuj kapablas aperigi fortigitan elektran naturon, fortigitan pensostaton, fortigitan sentosimpatistaton, kiun ni nomas enamiĝo. Tiu ĉi enamiĝo kunligas la homojn, kaj ĝi funkciigas la pariĝan instinkton, kiu necesas, por ke povu kreiĝi novaj organismoj por la elkarniĝintaj estuloj. Ili enkarniĝu sur la tero, kaj pro tio kreiĝu novaj organismoj, pro tio la pariĝa instinkto daŭre ekzistu. Samtempe la la pariĝa impulso estas la plej alta lumo por la estuloj en la primitivaj stadioj malsupre en la bestoregno kaj ankoraŭ por plej multaj homoj. La granda plimulto de homoj ne konas iun pli altan lumon ol la geedza enamiĝo, la plej alta beatostato.

Sed ankaŭ ekzistas grupo da homoj, kiuj atingis pli longe evolue, kaj kiuj distingas sin per havi alian simpatistaton. La mala poluso, kiu donis al la homoj la inteligentevoluon, pro kiu ili ricevis sufertravivaĵojn kaj spertoevoluon, kreis kaj evoluigis tiun ĉi alian simpatikapablon. Ĝi kresku kaj atingu stadion kiu ne nur rilatas al karesumado kaj havi mildan kaj afablan naturon ktp. Ĝi estu antaŭenigita al stato en kiu oni estas ligita al ĉiuj aliaj estuloj, absolute ligita al ili, jes preskaŭ eĉ pli ol kiel viro kaj virino estas kunligitaj. Tia ja estas la estado en la plej altaj spiritaj mondoj, kie la homoj ne estas dividitaj laŭ viro kaj virino aŭ virsekso kaj insekso. Tiam ne estas tio, kio portos la estadon.

En la geedzeco do estas tiu ĉi enamiĝtendenco, kiu portas kaj konservas la geedzecon. Ekster la geedzeco temas pri fremdaj estuloj. Sed hodiaŭ oni tamen devas diri, ke per la forto de la simpatio, kiu jam estas evoluigita tra la suferoj, la estuloj povas per tiu ĉi nova simpatio ekster la geedzeco krei agrablajn amikecojn, fidelajn amikecojn, kunumademon kaj ĉiajn kunvenojn. Ĉio ĉi tio ja estas esprimo de speco de simpatistato, kiu en la realo ne vere estas ligita al la geedzeco. Sed tio ĉi, ke la simpatio de la estuloj tiel kreskas kaj kreskas, kaj tio ĉi, ke la mala poluso kreskas, gvidas la homojn pli antaŭen, kaj tio kaŭzas, ke la simpatio transiras al fariĝi ankaŭ sekseca. Ambaŭ polusoj ja estas seksaj polusoj, senkonsiderante, ke ili ankaŭ per tiu ĉi stato estas la plej alte funkciantaj organoj, kiujn la mio disponas. La du polusoj stiras kaj reguligas la evoluon de ĉiuj vivaj estuloj, ilian naturon kaj veturon tra la regnoj de la spiraloj. La du polusoj stiras ĉiujn tiujn ĉi aferojn kaj la tutan universon, kaj tial oni komprenu, ke la enamiĝstato, la pariĝa avido, kiun la bestoj havas, estas io, kion la homoj elkreskos.

*De prelego, La plej alta fajro 3, 1960-02-29*

[La supra parto 94.2 ne estis akompanita de iu simbolo.]

# La dupolusa estulo

## Simbolo n-ro 95

**95.1** La simbolo montras la dupolusan estulon. Ni vidas, ke okazis granda ŝanĝo kompare kun la unupolusa estulo. La besteca tute malaperis, ne plu ĉeestas instinktenergio aŭ pezenergio. La oranĝkolora fonkoloro signifas, ke estas fizika estulo, kaj ke ĝi estas en fizika sfero. La ronda flava figuro simbolas la femalan poluson, kaj la verda simbolas la masklan poluson. Ni vidas,

ke la maskla kaj la femala polusoj fariĝis egalaj. Ni vidas, ke venis multe da sento (flava koloro) kaj multe da inteligento (verda koloro) kaj multe da intuicio, multege da intuicio (blua koloro). Ekzistas difinita ekvilibro. La plej malsupra blua kampo signifas, ke temas pri preta estulo. Ĝi ne bezonas enkarniĝi sur la tero denove. Kiam ĝi atingis ĉi tiun ekvilibron inter la polusoj, tio signifas, ke ĝi estas treege amema, ke ĝi kulminas en amemo. La dupolusa estulo havas altan intelekton, kaj ĝi havas la intuicion en sia povo. Ĝi estas tutplene kosma estulo cent-elcente.

*De prelego, Tra la morto 2, 1958-05-02*

**95.2** Jen ni havas la perfektan homon, kaj ni vidas, kiel la polusoj estas egalaj kaj kreas ekvilibron. En la meza kampo ni vidas la energiojn, kiuj dominas en la konscio de tiu ĉi estulo. Ĝi ekhavis multege da intuicio, kaj tio signifas, ke ĝi havas kosman konscion. Ĝi kapablas rigardi kaj sperti ĝuste tiom multe, kiom ĝi volas, kaj ĝi povas vidi la solvon de ĉiuj spiritaj problemoj. De la kampoj ni vidas, ke ĝi havas multe da inteligento kaj multe da sento. Ili estas en ekvilibro, ili estas proksimume egalaj kaj kreas amon. Tiel ja devas esti, por ke la intuicio povu disvastiĝi. La intuicio ne povas veni al brutalaj, primitivaj homoj, ĝi nur venas al homoj, en kiuj la humaneco komencas validi. Kiam amo aŭ sento kaj intelekto komencas validi, ili ekestas humanaj, kaj tiam venas la intuicio.

Ni vidas, ke la perfekta homo estas ekipita per multaj intelektaj konscienergioj, kiuj konsistas el la grandaj bazenergioj: intuicio, sento, inteligento kaj denove intuicio. La superkonscio estas simbolita super kaj sub la du dikaj horizontalaj strekoj, kaj ni vidas ke la polusoj estas en ekvilibro. En ĉi tiu homo ne povas ekesti ĵaluzo, envio ktp. Kontraŭe, tiu ĉi estulo estas, kiel oni diras, "unu kun Dio". Same multe kiel ĝi volas, ĝi povas havigi al si scion pri la strukturo de la universo, la enigmoj de la vivo kaj tiel plu.

*De prelego, Post la morto, 1958-06-06*

**95.3** La simbolo montras la malon de unupoluseco, nome la dupolusecon. Ambaŭ polusoj estas ordinaraj, ĉar nun ili estas same grandaj. La estuloj havas en si la kapablon povi sperti ambaŭ principojn. Ili havas tion en si.

Ni vidas la grandan intuician sferon (blua koloro supre kaj malsupre sur la simbolo). En la subkonscio inter la du dikaj horizontalaj strekoj ni vidas la amosferon (flava koloro), la inteligentosferon (verda koloro) kaj la tre intuician sferon (blua koloro). Temas do pri la plej alta stato de konscio.

Kiam la estulo atingas tiun ĉi stadion, ĝi fariĝis la perfekta homo en la bildo de Dio. Tiel la plano de Dio pri la homo estas preta, kaj tiam komenciĝas la vera vivo. La homo tiam aperas en sia primara stato, post ke ĝi ĝis nun devis vivi enkarniĝinta kun fizika korpo. La fizika korpo estas farita el makrokosma materio. Sed ĉar la homo estas spirita estulo, ne estas tiom strange, ke tiu ĉi makrokosma materio estas tre peza kaj malfacile uzebla, sed tia ĝi devas esti, ĉar por povi trakti ĝin ni evoluigis la logikan senson. En nia propra sfero, do la spirita sfero, en kiu ni estas en nia spirita korpo, ni povas elmontri ĉion kion ni pensas kaj kion ni deziras ktp. Tion ni povas elmontri per pensado, kaj tio estas do la avantaĝo pri tio. Al tio la homo povas trejni sin, kaj tio montras, ke la homaro vere estas sub dieca plano. La Biblio verdiktas, kiam ĝi esprimas la aferon tiamaniere, ke Dio diras: "Ni kreu homon laŭ Nia bildo similan al ni". Estas tiu ĉi perfekta homo, kiun ni vidas sur la simbolo.


*De prelego, La plej alta fajro 2, 1960-02-22*

**95.4** La simbolo montras, ke estas ekvilibro inter la maskla kaj la femala polusoj. Inter la du dikaj horizontalaj strekoj ni vidas la konscioenhavon. Ni vidas, ke tie estas intuicio. Tie estas inteligento kaj sento, kaj estas tio, kio fariĝas amo. La sento ankaŭ povas esti nur malmulte evoluinta, sed tiuokaze ĝi ne estas amo, ĉar ĝi povas ankaŭ esti naivboneco ktp. La sento estu regulita, ĉar amo ne estas naivboneco. Amo estas tute intelekta stato.

La violkoloro simbolas la kosmajn principojn, ĝi simbolas la superkonscion, kiun ni vidas plej supre kaj plej malsupre sur la simbolo.

*De prelego, La plej alta fajro 4, 1960-03-07*

**95.5** La simbolo montras la plej evoluintan homon, la plej perfektan homon. La polusoj fariĝis egalaj kaj la estulo fariĝis dupolusa. La homa naturo venkis kaj fariĝis tute reganta. La du polusoj fariĝis egalaj. Tio okazas, kiam la mortigstato de la ordinara poluso malaperis, kaj kiam la ampoluso aperis, kaj kiam ili ekhavis kontakton unu kun la alia. Super kaj sub la du dikaj horizontalaj strekoj ni vidas la superkonsciregionojn, kaj inter ĉi tiuj du strekoj ni vidas la subkonscion. Ni vidas, ke la sentoregiono estas elstare evoluinta, ĝi estas plenigita per humaneco, kaj ni vidas grandan inteligentregionon, kiu harmonias kun la sento. Tio montras, ke la sento estas intelektigita, tio signifas, ke la sento estas logika. La sento estas logika, kiam sento kaj inteligento estas en ekvilibro, kio estas la samo kiel amo. Tiu ĉi estulo do havas enorman gradon da amo. Sed sekve ĝi ricevas ankaŭ enorman gradon da intuicio, tiel ke ĝi estas tute konscia en la kosmaj



© Martinus Institut 1981 Reg. 95

*La dupolusa estulo*

planoj kaj en la tuta mistero de la universo. Ne troviĝas iu mistero por tia estulo. Ĝi konas ĉiujn leĝojn. Inter la stadioj de la unupolusa kaj la dupolusa estulo ni povas loki ĉiujn homojn sur la planedo.

*De prelego, La eterna vivo 4, 1962-05-17*

Tradukis Hokan Lundberg.

# La geedzeco

de Martinus



**1. La feliĉa geedzeco estas bazita sur organe enkonstruita aŭtomatfunkcio gvidata de ĉiorega instinkto**
La homoj de nia tempo vivas en mondo plena de problemoj, kaj kelkaj el la plej grandaj kaj plej malfacilaj amasiĝas en la regiono, kiun ni nomas la geedzeco. Malfeliĉaj geedzecoj kaj divorcoj nuntempe ne estas esceptoj, pli verŝajne, ke estas esceptoj, kiam oni renkontas homojn, kiuj vivas kune dum longa tempo en feliĉa geedzeco. Sed kio estas la kaŭzo de tio, ke la tera homo vivas en tio, kion mi nomas *la zono de malfeliĉaj geedzecoj*?

La problemo estas tre profunda, kaj por povi plene kompreni ĝin, ni devos direkti nian konscion al la bestoregno, ĉar tie ni trovas la originon de ĉiuj tiuj principoj, kiujn mi en tiu ĉi prelego traktos. En la bestoregno la kunvivado inter du estuloj el mala sekso estas la paradizo mem. En tiu ĉi paradizo ne okazas enmiksiĝo de inteligento aŭ konscia volforto, la feliĉa geedziĝo estas plene bazita sur organe enkonstruita aŭtomatfunkcio gvidata de ĉiorega instinkto. Kiam la idoj elkreskis kaj povas vivi memstare, ili animiĝas de avido, kiu gvidas ilin al estulo de mala sekso, kiu same estas regata de tia avido. Tiel ili praktike fariĝas vivbezono unu por la alia, ili ne konas aliajn vivcelojn, ili ne havas aliajn avidojn, kiuj kreas alian animecan deziregon. La reciproka dezirego al plene posedi la geedzon estas en la seksardoperiodo la fundamenta en la sinkonserva instinkto de tiuj ĉi estuloj. Iu ajn provo enmiksiĝi en tion ĉi kreus en la vir-estulo furiozan ĵaluzon plene vivriskan. Ke tiu ĉi kunvivado estas la paradizo mem en la vera bestoregno estas rakontata al ni per miloj da malgrandaj gorĝoj printempe, kiam la suno lumas kaj la varmo revenas, kaj la arbaroj kaj la kampoj verdiĝas. Estas glorkantado honore al la geedzeco, kiun ni aŭdas en la fluto de la sturno kaj en la triloj de la alaŭdo, la turdo kaj la najtingalo. Tuta tiu ĉi kantanta arego fariĝas protektanĝeloj por ĉiuj malgrandaj estuloj, kiuj estas iliaj idaro aŭ birdidoj enkarniĝintaj el la spirita sfero. Tiu ĉi bela birdokantado printempe kaj frusomere do efektive estas vivesprimo de "paradizo" kun "anĝela" glorkantado honore al la eterna, ĉiopova Dio.

**2. La teraj homoj estas travivantaj la elpelon el la paradizo; ili manĝis fruktojn de la arbo de sciado**
Sed kio nun pri la teraj homoj, ĉu ili troviĝas en la sama paradizo? Ne, ili ĝuste nun estas travivantaj "la elpelon el la paradizo". Ili "manĝis fruktojn de la arbo de sciado pri bono kaj malbono". Tio signifas, ke ili ne plu bazas siajn vivojn sole sur la aktivado de instinktecaj aŭtomatfunkcioj, sed komencas mem influi la strukturon de la estado per sia maldorma tagkonscia inteligenteca volgvido. Oni komencis ekinteresiĝi pri kreado, kaj tiu intereso tiom multe kreskis, ke ne plu estas, kiel ĉe la bestoj, nur nestoj aŭ idujoj, kiujn oni volas formi, sed oni ankaŭ deziras pli aŭ malpli altgrade interveni en kampojn, kiuj ne rilatas al la geedzeca kunvivado. Oni do ne plu sekvas la leĝon de sia animala organa strukturo, sed pli kaj pli transiras

al bazi sian vivon sur sia maldorma inteligento. La pensanta kaj kreanta tera homo ne plu estas estulo, kiu apartenas al la paradizo de la bestoj, eĉ se ĝi dum periodoj, aparte kiel juna homo, travivas parteton el ĝi, kiam ĝi estas enamiĝanta al estulo de mala sekso. Enamiĝintaj homoj travivas dum momento “la perditan paradizon”, kaj ofte opinias, influata de la ebrieco de enamiĝo, ke tiu ĉi stato povas daŭri eterne, almenaŭ dum tuta vivo, kaj ili geedziĝas kaj ekhavas infanojn, sed dum iu bela tago ili eble rimarkas, ke ili ne havas ion komunan krom la infanojn, kiujn ili ekhavis. Unu el ili (aŭ ambaŭ) eble enamiĝas al iu alia kaj opinias, ke se li (ŝi) nur ricevus ŝin (lin) anstataŭ sian geedzon, tiuokaze la vivo estus pura feliĉo. Ili disiĝas, kaj eble ambaŭ geedziĝas denove por, post kelka tempo, malkovri, ke ankaŭ tiu ĉi geedzeco ne fariĝis tio, pri kio oni kredis, ke ĝi fariĝos. La infanoj fariĝis divorcinfanoj kaj travivas, se ili estas sentemaj, malkondordon kaj senradikecon en siaj vivoj, kiuj povas doni grandan suferon kaj doloron al ili.

**3. La teraj homoj estas transirestuloj inter besto- kaj homostato**

Sed kial tiu faktoro, ke la homo komencas pensi kaj krei, detrue envenas en la kapablon, de la sama estulo, havi centelcente feliĉan kunvivadon kun geedzo? Pro tio ke la teraj homoj kaj psike kaj fizike estas submetitaj al ŝanĝiĝproceso. Ili ne plu estas veraj bestoj, eĉ se ilia organismo daŭre estas mambestorganismo, kaj ili ankoraŭ ne estas veraj homoj, ili estas transirestuloj inter besto- kaj homostato kun iom el la energidisvolvo de ambaŭ zonoj en siaj konscio kaj organismo. Tiu homo, kiu, dum miloj da birdogorĝoj elkantas glorkanton pri la paradizo, al kiu la bestoj apartenas, ploras pri la partnero, kiu perfidis, kiu estis malfidela kaj foriris kun iu alia, estas estulo, kiu estas metita ekster la paradizon. Ĝi troviĝas ekstere en la mallumo, kaj la geedzo, kiu estis malfidela, iom poste malkovros, ke la absoluta feliĉo ankaŭ ne estis trovebla ĉe la nova partnero. Ili ne plu povas sperti la paradizon de la besto krom dum feliĉaj briletoj, kaj iun pli altan paradizon ili ankaŭ ne konas. Kion la dieca mondoplano povas diri al tiaj estuloj?

**4. La kosma polusprincipo**

Ĉiuj variaĵoj de malfeliĉaj statoj ene de la seksa kampo, kaj inter ili ankaŭ la multaj malfeliĉaj geedzecoj, sub kiuj la homoj de la tero suferas en nia tempo, havas sian radikon en la kosma principo, kiun mi en miaj analizoj nomas *la polusprincipo*. Tiu ĉi principo akcelas la evoluon de ĉiu konscivivo tra ĉiuj mensaj evoluŝtupoj de la vivaj estuloj en la universo. Ĝi kaŭzas, ke ilia sorto estas luma aŭ malluma, ke ili aperas kiel vir-estulo aŭ in-estulo aŭ kiel estulo, kiu havas ekvilibron inter sia maskla kaj femala polusoj kaj reprezentas evoluŝtupon, kiun la tera homo ankoraŭ ne atingis ene de sia nuna evoluspiralo. Neniu terhomo estas cent-elcente viro aŭ centelcente virino; la cent-elcente masklajn aŭ femalajn estulojn oni trovas en la vera bestoregno, kie la mala poluso en la estulo estas latenta. Ĉe ĉiuj viroj kaj virinoj de la homaro la mala poluso, por la viro tio signifas la femalan poluson kaj por la virino la masklan poluson, estas sub evoluo. Tiu ĉi poluskonstelacio kaŭzas, ke la konscio kaj interessfero de la estuloj estas dividitaj, tiel ke ili fariĝas iaj duoblestuloj. Ene de la seksa regiono ili estas firme submetitaj al sia pariĝa instinkto. Tiu ĉi instinkto ekzistas kiel ia prainstinkto en ilia konscio, kaj ĝi kaŭzas ilian intereson pri kaj dependeco de la potencprincipo. Sed ilia konscio havas ankaŭ alian parton, parton, kiun la besto ne havas. Tiu ĉi parto estas reprezentita de pensado, scio, ideoj, interesoj pri sociaj demandoj, religio,

arto, tekniko, scienco ktp, ĉio tio estas io, kio ne rilatas al la generado. La admiro kaj la intereso pri la geedzo povas okupi grandan aŭ malgrandan parton de la konscio de la terhomo, sed ne tiom multe, ke virino povas atendi plene posedi sian edzon, same kiel viro ne plu povas kalkuli pri plene posedi sian edzinon.

**5. La geedzeco estas unu el la plej grandaj elprovoj de la teraj homoj, ĝi estas spirita turnŝlifilo**

La tera homo do havas interessferon, kiu kaŭzas, ke ĝi estas besto, kaj novan flankon, novan interessferon, kiu montras, ke ĝi survojas al fariĝi alispeca estulo, vera homo. Ĝi havas en sia konscio prastaton, kiu estas degeneranta, kaj alian flankon, kiu estas evoluanta, kaj estas klare, ke tiuj ĉi statoj estas en reciproka konflikto kaj pro tio facile aperigas malĝojon kaj suferon. La enamiĝanta terhomo, kiu estas reamata, travivas diecan renkontiĝon kun la paradiza ĝardeno, ĝi ricevas "animalan" sperton de la "granda naskiĝo", kio signifas enan mensan ekvilibrostaton, en kiu ĉio radias en dieca lumo. Tiu ĉi totala, feliĉa kuniĝo konsistigas tion, kion ni nomas *feliĉa geedziĝo*. Sed normale tiu ĉi enamiĝo daŭras ne longe. Ne estas kutima afero renkonti homojn, kiuj konstante estas enamiĝintaj reciproke dum ekzemple dudek kvar jaroj. Male, estas tiel, ke la vivo konfirmis la kulminon de enamiĝo kiel limigitan aferon. Al tiu ĉi kulmino oni donis la nomon *mielmonato*. La longeco de tiu ĉi periodo ja povas kompreneble varii ekde tagoj kaj monatoj ĝis jaroj, kaj la homo spertas tra ĝi lastan saluton de pasinta zono de radianta paradizo. La demando do estas, ĉu la reciproka amikeco kaj la komunaj interesoj kaj aparte grave la amo al la infanoj havas tian fortecon, ke la geedzoj povas havi harmonian kunvivadon bazitan je tiuj ĉi homaj kapabloj, ankaŭ kiam la periodo, en kiu la enamiĝo estas malpli forta, alvenas? Miloj da homoj ne havas la paciencon elprovi tion ĉi, sed ĵetas sin en novajn rilatojn, en kiuj ili eble denove post iom da tempo suferas ŝiprompiĝon, kaj per kio ili, kaze ke ili perfidas la eksan geedzon kaj la infanojn, altiras sur sin malagrablan sorton en venonta vivo. La geedzeco estas momente unu el la plej grandaj elprovoj por la teraj homoj, ĝi estas spirita turnŝlifilo, kiu helpas forŝlifi la malmolajn kaj akrajn eĝojn en la terhoma konscio. El homa vidpunkto la geedzeco estas laborregiono, en kiu tiu, kiu emas labori pri sia propra evoluo, havas grandajn eblojn por venki multon de sia egoismo kaj memcentreco. Ne eblas eviti, ke homo montros siajn malpli belajn flankojn al siaj plej proksimaj, al tiuj, kun kiuj ĝi interrilatas ĉiutage, pro tio ankaŭ en la geedzeco bezonatas komprenemo, toleremo kaj homa amo, kaj estas ja ĝuste tiuj trajtroj, kiuj fariĝos gravaj faktoroj en la konscifunkciado de la vera homo. Kompreneble povas esti situacioj, kiuj estas tiom seriozaj, ke unu el la partneroj, eĉ se estas infanoj, devas uzi la malnovan esprimon "se vi iros dekstren, mi iros maldekstren", kaj tiuokaze plej bonus se oni povas venki la malamon aŭ la amarecon, kiuj eble kolektiĝis en onia konscio kontraŭ la alia partnero. En la realo la alia estas nur ilo, per kiu oni rikoltas tion, kion oni mem iam semis.

**6. La laŭgrada evoluo de la mala poluso en la menso estas spertata kiel onia homeca interesosfero**

Kiam la tera homo proksimiĝas al sia 30-jariĝo, tiam ĝiaj konsciorganoj estas plene evoluintaj kaj ĝia ripetadperiodo de pli fruaj vivoj estas fintrapasata. Ĉirkaŭ tiu ĉi periodo ĝia nova interesosfero vere komencas validi, kaj estas ofte tiam, ke la geedzecaj problemoj komenciĝas. Okazas, ke unu el la geedzoj malkovras flankon de la alia, kiun ĝi mem ne posedas, kaj tio ĉi povas esti

kaŭzo de ĵaluzo. Multaj geedzoj ĵaluzas je la interesoj de la kunulo. Per multnombraj interparoloj kun homoj, kiuj venis al mi, mi havis eblon observi ĉi tiujn aferojn kaj vidis, kiajn zorgojn kaj animajn krizojn ili kaŭzas. Estas mia devo atentigi pri ĉi tio, por ke vi per tio povu lerni kompreni vian geedzon. Kompreni sian geedzon signifas kompreni lian aŭ ŝian pensmanieron. Gravas por vi lerni kompreni, ke kiam vi geedziĝas, vi ligas al vi homon, kiu, krom sian intereson pri vi, ankaŭ havas interesflankon en sia menso, kiu ne rilatas al vi. Miaj kosmaj analizoj instruos al vi pri tio, ke kiam vi eniras geedzecon, vi reale geedziĝas al "ĝemelestulo". Tiu ĉi ĝemelnocio ne estas el fizika speco, ĝi estas psika, kaj estas de plej alta graveco, ke la homoj, iom post iom laŭ ilia maturiĝo, lernas ĝin koni. Ĉiu viro havas en sia menso "ĝemelfratinon", same kiel ĉiu virino havas en sia menso "ĝemelfraton". Ili sekve kunportas "ĝemelon" al sia geedzeco, tio estas io pri kio la plej multaj homoj ne konscias. Tiu ĉi ĝemelo estas bazita je la laŭgrada evoluo de la mala poluso, kaj ĝi percepteblas kiel onia homa interessfero. Ne estas la maskla poluso en la viro kaj la femala poluso en la virino, kiuj kreas la plej grandajn problemojn en la nuntempaj geedzecoj, sed male, estas la femala poluso de la viro kaj la maskla poluso de la virino, kiuj faras la nuntempajn geedzecojn malstabilaj.

### 7. Dum la nova interesosfero grandiĝas en la estuloj, subfosiĝas la enamiĝoinklino

Kial tiom da homoj hodiaŭ ĵetas sin en unu seksan rilaton post la alia, kiam ilia enamiĝokapablo ja estas degeneranta?

Kiam ili daŭre enamiĝas al novaj partneroj, oni povus kredi, ke ilia enamiĝkapablo male estus grandiĝanta. Ĉiuj ĉi tiuj enamiĝoj ne estas veraj enamiĝoj, kiel tiuj, kiuj aperas en junaj aĝoj. Ili estas iaspeca kompensaĵo. Kiam la enamiĝkapablo degeneras, kaj la komenciĝanta interesosfero ne estas sufiĉe forta por porti la konscimanifestadon de la estulo, tiam povas okazi, ke ĝi provas renovigi sian enamiĝokapablon per daŭre serĉi novan partneron. Ĝi ne konas la kosmajn fortojn malantaŭ sia propra estado, sed ĝi iom post iom ekkonos ilin. Kiam la nova interesosfero laŭgrade pligrandiĝas en la estuloj, subfosiĝas la enamiĝokapablo. Dum la besto pluspertas la enamiĝobezonon en formo de regulaj seksardperiodoj, ni vidas, kiel la sama bezono ĉe la tera homo pli kaj pli estas puŝita malantaŭen al la junaj aĝoj. Por ĉiu vivo la tera homo fariĝas pli maljuna, sekve tiu ĉi bezono estos ripetita pli kaj pli frue. Venas certa stadio en la fruaj junuljaroj, dum kiuj oni travivas la geedzecan principon ĝis perfekteco. Ĝi inspiros la tutan konscion, ĉar ĝi estas ripetado. La estulo tiumomente ankoraŭ ne atingis la spiritan maturecon, al kiu ĝi evoluis en sia pasinta vivo. Sen kono pri tiu ĉi fakta cirkonstanco ĝi sentas sin konvinkita pri tio, ke la sentoj, kiujn ĝi tiumomente nutras, estas el vivdaŭra karaktero, kaj ĝi geedziĝas por pli poste eble bedaŭri tion amare. En la venonta mondokulturo oni instruos al la homoj pri ilia propra naturo, kaj oni donos al ili edukon pri kio necesas en geedzeco, kaj kiujn kondiĉojn la tera homo havas por povi krei harmonian geedzecon. Ĉar tiu ĉi problemo ne estas solvita per geedziĝa atesto, farita de aŭ eklezia aŭ burĝa aŭtoritato. La portanta afero, la sola, sur kio eblas konstrui en nia tempo, se oni volas vivi en harmonia geedzeco, estas la anima kontakto kaj la komunaj interesoj. Se ĉi tiuj kondiĉoj ĉeestas, tiuokaze la geedziĝa atesto el plej profunda vidpunkto estas superflua.

De prelego en la Instituto de Martinus dimanĉon la 3an de februaro en 1946. Prilaborita de Mogens Møller. La prilaboro estas aprobita de Martinus. Tradukis Hokan Lundberg.




# Recenzo pri "Martinus kaj la monda moralo" de Ole Therkelsen

de Mihai Trifoi

La jaro 2016 alportis al ni novan interesan libron: "Martinus kaj la nova monda moralo" de la dana aŭtoro Ole Therkelsen. Publikigita en 2009 de eldonejo Borgen, en Danio, kun la titolo "Martinus og den ny verdensmoral", ĝi aperis en Esperanto en 2016 ĉe eldonejo Scientia Intuitiva, en Danio, en la 1-a eldono laŭ traduko el la dana fare de Jens Stengaard Larsen. La libro estas jam eldonita en ses lingvoj: Esperanto, dana, sveda, angla, hispana, rusa.

La aŭtoro de la libro, Ole Therkelsen, naskiĝis en 1948 kaj estas diplomita kemiisto ĉe Teknika Universitato de Danio, kaj biologo ĉe Universitato de Kopenhago. Li "skribas surfone de sia tutviva engaĝiĝo en la Kosmologio de Martinus" kaj faris ĝis nun ĉirkaŭ 2000 prelegojn en dek kvin landoj en ses lingvoj. Kiu deziras aŭskulti lin povas fari tion ĉe oletherkelsen.info; kelkaj el ili estas alireblaj ĉe www.oletherkelsen.dk kaj www.youtube.com.

Studante profunde la verkaron de la dana spirita esploranto Martinus (1890-1981) en sia libro Ole Therkelsen montras ke Martinus komencis sian agadon "en monda situacio karakterizata de krizoj politika, ekonomia, media kaj saneca – alivorte, la mondo kia ni hodiaŭ konas ĝin". Pro tio la instruo de Martinus celis doni "la principojn de nova monda moralo, kiu fundamentas la kreadon de kulturo de amo kaj paco sur la tero". Lige de tio, el la libro de Ole Therkelsen ni ekscias ke la plej gravaj elementoj en la Kosmologio de Martinus, kiu "estas karakterizebla kiel integra mondbildo en kiu ĉio estas reciproke interligita" estas: "la evoluigo de nova kulturo de pardonemo kaj pli sana



vivmaniero, la kreado de unu justa monda ŝtato, la enkonduko de la monda lingvo Esperanto, vegetarismo, la montrado de pli granda amo al plantoj, bestoj kaj homoj – al ĉio vivanta, tiel en la mikro- kiel ankaŭ en la mezo- kaj makrokosmo".

Esplorante kaj ekzamenante la vivon de Martinus, en sia libro la spertulo en la kosmologia kampo, Ole Therkelsen, prezentas al la legantoj "tiujn cirkonstancojn, spiritajn tendencojn kaj personojn kiuj havis signifon por Martinus kaj lia instruo", kaj samtempe li "komunikas la rigardon de Martinus pri la aktuala monda krizo kaj kiel la homaro povas atingi pli altan evoluŝtupon".

La aŭtoro mencias ankaŭ la fakton ke, laŭ la instruo de Martinus, "Ekzistas naturleĝoj pri la evoluo de plantoj, bestoj kaj homoj" kaj "Se oni konas tiujn leĝojn, oni povas antaŭvidi la direkton kaj la rezulton de la evoluo". Li mencias ke "En sia verkaro: "La Kosmologio de Martinus", 10.000 paĝoj, Martinus priskribas la homan evoluon dum la sekvaj 3000 jaroj". Ole Therkelsen rimarkas ke, el la biologia vidpunkto la ĉefa temo estas la evoluo de la korpo, dume el la kosmologia vidpunkto la ĉefa temo estas la evoluo de la konscio, la evoluo de la nova monda moralo.

El ĉi tiu lasta vidpunkto, kiu rilatas al instruo de Martinus pri la evoluo de la konscio, la libro de Ole Therkelsen traktas la evoluon de nova monda moralo en ses kampoj: Monda lingvo Esperanto (ĉap.7), Monda politiko pri la medio (ĉap.5), Internacia monda ŝtato / politiko/ (ĉap.6), Rilato al bestoj /vegetaranismo/ (ĉap.8), Saneco, rilato al mikroestuloj (ĉap. 9-10), Filozofio, religio, etiko, homaranismo (ĉap.11-15).

Tiel la libro de Ole Therkelsen ne servas nur kiel enkonduko en la verkaron de Martinus, sed ĝi "montras la konturojn de nova kulturo bazita sur la nova monda moralo kaj turnas sin al ĉiuj kiuj interesiĝas pri politiko, scienco, filozofio, medio, sano kaj paco".

En la opinio de la aŭtoro (sed kompreneble ankaŭ de Martinus) "La savo de nia planedo estas nova monda moralo, ĉioamo, amo al ĉiuj vivaj estuloj, al ĉeloj, organoj, organismoj, bestoj, homoj, nia terglobo kaj tuta universo. Scio pri la naturleĝoj de la evoluo ebligas al la tera homo ekregi sian menson kaj laŭ la tempo krei mondregnon de amo sur la Tero. Tiuj naturleĝoj de la evoluo nepre kondukas ĉiujn homojn sur la tero al la rezulto – la finevoluinta, la perfekta kaj tutama homo. Unu Dio, unu mondo kaj unu lingvo".

La legantoj de la libro povas malkovri tiujn ideojn en instruaj kaj eĉ amuzaj tekstoj sub la titoloj kiel: Martinus ekhavas kosman konscion, Kriŝnamurti kiel mondinstruisto, Profetaĵoj pri la dana mondinstruisto, La sekreto de la piramido, La terglobo – vivanta estulo, La monda ŝtato, Amo al la bestoj, Malsaneco kaj kuraco, La Krista moralo, Kompreni la eternecon, La reveno de Kristo, sed kompreneble por multaj esperantistoj la titolo de la 7-a ĉapitro, kiu enhavas 30 paĝojn pri Esperanto, ŝajnas esti la plej alloga.

Troviĝos ankaŭ legantoj, kiuj opinios ke la libro estas tro religia aŭ filozofia aŭ ke la enhavo estas tro utopia, sed sendepende de ĉiuj opinioj, oni meritas legi ĝin, ĉar tiu libro igas la homon pensadi pli profunde pri la mondo en kiu ni vivas nun, provante per logiko penetri en la estonton de la homo kaj de la homaro.

La interesuloj povas legi ankaŭ la verkon "Martinus, Darwin kaj inteligenta dizajno" de la sama aŭtoro, libro eldonita en ok lingvoj: dana, sveda, angla, germana, hispana, franca, kroata kaj rusa. Oni povas trovi ĝin ĉe:
www.katalogo.uea.org,
www.martinusshop.dk aŭ
www.oletherkelsen.info.



# Centro Martinus – Herrera del Duque

de Javier Romero

La 9an de septembro de 2016, inaŭguriĝis nova Centro en Herrera del Duque, Hispanio. La nova Centro estas dediĉita al la disvastigado kaj instruado de la verko de Martinus (1890-1981).

Al la inaŭguro venis, el Danio kaj Hispanio, geamikoj kaj interesitoj pri la verko de Martinus. Estis trankvila sed tre emocia inaŭguro. Eksplikinte al la ĉeestantoj pri kiu Martinus estas kaj pri la graveco de lia verko, oni hisis malgrandan flagon, kiu simbolas la tutan vivon aŭ universon.

Dum la prezentado oni klarigis ke ĉi nova *Centro Martinus* estas la rezulto aŭ materiiĝo de revo. Revo kiu komencis en 2003, kiam bona amiko el Svedio venis al Hispanio kaj montris al ni kelkajn libretojn de Martinus.

Tiamaniere la verko de Martinus atingis Hispanion kaj Herrera'n del Duque. Kaj ekde tiam, la intereso pri la verko de Martinus ne ĉesis kreski. Danke al mon-donaco de germana interesito pri la verko de Martinus oni povis aĉeti grandan nombron da libroj jam tradukitaj al la hispana. Tio instigis nin krei lokon por surbretarigi la librojn de Martinus kaj samtempe lokon kie oni povus fari seminarion kaj prelegojn pri la Kosmologio de Martinus al la malnovaj interesitoj kaj novaj interesatoj.

En marto de 2016, oni komencis la laboron. La ideo estis inaŭguri la Centron la 3an de julio, kadre de la 75a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazadis dum tiuj datoj en Herrera del Duque, sed la Centro ne estis preta tiam.

La Centro Martinus de Herrera del Duque estas 50 kvadratmetra loko, kiu havas terason, necesejon, tablojn, seĝojn, bretarojn kaj ampleksan salonon por prelegoj.

Tiun semajnfinon, 9an-11an de septembro, oni profitis por fari hispanan



*Partoprenantoj de la inaŭguro ĝuas la naturon en Herrera del Duque*



*Partoprenantoj ĉe la solena inaŭguro de Centro en Herrera del Duque, kiu estas dediĉita al la instruado de la verko de Martinus.*



*Martha Font en 2016 finis la tradukon de la sep volumoj de Livets Bog el la dana en la hispanan, proksimume 3.000 paĝojn. Javier kaj Martha interparoladas.*

Seminarion pri la verko de Martinus, en kiu partoprenis la ĉeestantoj de la inaŭguro.

Martha Font kaj Edith S. G. prezentis la verkon de Martinus la 10an de septembro sabate matene. Poste oni laboris grupe pri la Antaŭparolo de *Livets Bog*. Vespere Martha faris prelegon titolita "El objetivo de nuestra vida a la luz de la obra de Martinus" ("La celo de nia vivo laŭ la verko de Martinus"), kaj dimanĉe matene, mi mem prelegis pri "La nueva cultura" ("La nova kulturo").

Estis tre speciala, agrabla kaj emocia semajnfino por ĉiuj.

La verko de Martinus estas fonto de inspiro, aro da scio destinita al la estonta homo.

Mi volas dankegi al ĉiuj, kiuj ebligis ke la nova Centro Martinus de Herrera del Duque realiĝis.

Ĉiuj interesitoj pri la verko de Martinus estas ĉiam bonvenaj.

Elkorajn salutojn el Hispanio!

INFORMO PRI

## LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) preskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg
kaj Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.






# Bonvenon al Martinus-Centro, Klint!

## Pri la kosmologio de Martinus

- Ĝi donas logike bazitajn respondojn al multaj fundamentaj demandoj pri la vivo.
- Ĝi povas motivigi optimisman vivsintenon, kaj doni bazon por harmoniaj kaj simpatiaj rilatoj al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Tiel ĝi povas kontribui al la progresigo de la humana evoluo de la homaro.
- Laŭ la analizoj en *La Tria Testamento* "ĉio estas tre bona" el eterna perspektivo. Ili ankaŭ donas defendon al ĉiuj homoj, kiuj ĉiuj senescepte nur povas agi laŭ siaj ĝisnunaj spertoj.
- La kosmologio igas "alturni ankaŭ la alian vangon" kaj "ami sian proksimulon kiel sin mem" scienco kaj ĝi montras ke ni ĉiuj iĝas pli kaj pli amemaj kaj saĝaj, vivon post vivo.
- Ne ekzistas iaj ceremonioj aŭ membreco rilate al la kosmologio de Martinus.




## Eo-semajnoj en Martinus-Centro en 2017

Inter la 30-a de julio kaj 12-a de aŭgusto 2017 la Esperanto-semajnoj en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Estos prelegoj, studrondoj, konversaciaj rondoj, kaj en la vespero estos distra programo, teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen. Pli da informoj ĉe esperanto@martinus.dk

## Kiel trovi Martinus-Centron en Klint

De Kopenhaga Centra Stacio (Københavns Hovedbanegård) unue per trajno al Holbæk. Tie necesas ŝanĝi trajnon, al Højby aŭ Nykøbing Sjælland. De tie al Martinus-Centro per aŭtobuso n-ro 563 aŭ per taksio. La vojaĝo de Kopenhago al la urbeto Klint daŭras ĉirkaŭ tri horojn.

Por aliĝi, bonvolu skribi al Martinus-Instituto aŭ esperanto@martinus.dk.

Martinus-Centro